

Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto
129
somero 2022



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

nia federacio sur Facebook

<http://www.facebook.com/esperantoprovence>

prezidanto

Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

aliĝkoto (kun la gazeto)

6 €

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Nicole Lafitte
(ĉe la supra adreso de
Pierre Oliva)

sekretario

redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain
48 avenue Alexis Godillot
83400 Hyères
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

**limdato por sendo de
publikotaĵoj por la venonta n°
25-a de septembro 2022**

bonvolu sendi al la supra retadreso

>>><

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

Vorto de la prezidanto

Kian someron ni travivos ĉijare?

Mi esperas ĝin bela kaj trankvila por vi, sed atentu pri la Kovim-viruso, kiu plu estas aktuala en nia regiono kaj ankaŭ ĉie, fakte. Ni plu estu singardaj!

Mi timas, ke la sento de libereco, tiu de la feriaj somermonatoj, estos sekvata de malbonaj surprizoj ekde septembro!

Do, atentu sed tamen profitu de la bela vetero por promeni, ludi kaj ripozi.

Plej amike...

Pierre Oliva



enhavo

2	> federacia komitatkunsido > el la provencaj asocioj	7	> paĝo de la komencantoj
3	> vojaĝemaj Provencaĵoj	8	> humuraĵoj > agendo
5	> saluto al Ukrainio		
6	> legindaj verkoj	+	> reta suplemento Pac- Alvoko

Federacia komitatkunsido

Post unu jaro sen komitatkunsido, ĉefe pro la san-krizo, la komitato de nia federacio denove kunvenis, la 23-an de junio, ĉe Renée Triolle en La Ciotat.

Post nia bonvenigo al nova komitatano, Marica Bošnjaković, ano de la klubo Fréjus/Saint-Raphaël, loĝanta en Les Arcs-sur-Argens, ni pritraktis diversajn temojn, kiel ekz. organizadon de la septembraj foiroj de asocioj kaj de la novembra staĝo en Le Beausset.

Ni parolis ankaŭ pri la Esperanto-tago en julio, la tago de Eŭropaj lingvoj en septembro, pri la eldonprojekto de "La Mil kaj Unu Noktoj"...

rap. Pascal V.



ne povis ĉeesti
Nicole L., Monique A. kaj Gilles W.

El la provencaj asocioj



13 - Espéranto-Marseille

En la n° 127 de nia gazeto, vi povis legi leteron de Thierry Spanjaard al la urbodomo de Marseille pri la malapero de ĉiuj stratplatoj en "Rue du Docteur Zamenhof".

Jen kontentigaj respondo kaj solvo: ĉiuj stratplatoj estis ree instalitaj!



"Bonjour Monsieur,
Suite à votre courrier, Madame Chaboche a interrogé les services concernant la disparition des plaques de noms de rues que vous aviez signalé. (tiel!)

Il lui a été répondu que la pose des plaques de rue relève des services métropolitains de la voirie.

Madame Chaboche a le plaisir de vous informer que ceux-ci vont donc être saisis afin qu'une réponse vous soit fournie dans les meilleurs délais.

Dans l'attente et restant à votre disposition,

Bien cordialement

Sylvie Monteil

Assistante de Mathilde Chaboche

Adjointe au Maire de Marseille

Déléguée à l'Urbanisme

et au Développement Harmonieux de la Ville"



83 - Esperanto-Klubo Fréjus - Saint-Raphaël

Membroj de niaj Eo-asocioj maljuniĝas, kluboj malaperas, kaj ni ofte plendas pri nealiĝo de novaj anoj, ĉefe junaj. Tie, kie plu vivas asocio, la membronombro ne plu estas tre granda.

Ĉu la klubo de Fréjus - Saint-Raphaël estas escepto?

Spite la suprajn asertojn, ĝi kapablis kunigi 29 personojn, dimanĉon la 26-an de junio, en la bela hotelo de Les Issambres, kiu gastigas ĉiujare la MES-staĝantojn.

Posttagmeze, la plejmulto el la ĉeestantoj partoprenis en ludoj proponitaj de Christine kaj Pascal, kiuj celis paroligi ĉiujn... en Esperanto!

Resume: agrabla kunveno en Esperanta etoso, kun la promeso revidi unu la aliajn por pikniko en septembro ĉe Marica kaj Vinko.

raportis Pascal V.





Bonan tagon! Mi nomiĝas Ĉispa.
Kiel vi nomiĝas?...

*En Saint-Raphaël,
Carmen nelacigeble
reklamas pri Eo,
helpe de sia
hundineto,
kaj de klariga afiŝeto,
kiu allogas
preterpasantojn.*



83 - Esperanto-Hyères



ĉiumonate okazas nia Esperanto-kafejo, lastmerkrede.

Renée Triolle

Vojaĝemaj Provencanoj

Nacia kongreso en Trélissac

Bone flegitaj kongresanoj, aktualigita prahistorio, mizera publika uzo de Esperanto.

Post du jaroj sen fizikaj renkontiĝoj, estis vera plezuro kongresi apud Périgueux, en tre taŭga kongresejo: multaj ĉambroj, konstante funkcia trinkejo, kie eblis sidi kaj diskuti. Pro la feriaj tagoj kaj malmultaj eblecoj manĝi en la proksimeco, la LKK organizis plurajn komunajn manĝojn: aperitivo de la regiono (kie ne mankis trinkeblecoj), honorvino (kun lastminuta alveno de la urbestro), pikniko, amika aperitivo kun atento al ekologio: invito konservi sian kartonan glas-on kaj uzi ĝin plurfoje, lignaj manĝilaroj ktp.

Ĉar ni kongresis en regiono kun riĉa historio (pli ol mil kasteloj, multaj grotoj, historiaj urboj), ne mankis ekskursoj. Mi partoprenis nur la ekskurson al la kopio de la groto de Lascaux, bedaŭrinde nur en la franca, kaj mi kompatas la dekon da eksterlandanoj, kiuj vizitis nin! La publika afiŝo, kiu aperis ankaŭ en gazet-artikolo, rilatis al prahistorio. Ni aŭdis tre interesajn prelegojn: "Lascaux et le ciel de la préhistoire", kie Jègues-Wolkiewiez argumentas, ke kiel en egiptaj piramidoj, ĉe solsticoj la suno atingas iun punkton; "La préhistoire dans la littérature de science-fiction" far Christian Grenier, kiu subskribis sian libron; "Le secret des bois de Lascaux" far Philippe Bigotto. La prelegoj okazis en la franca, kun traduko projekciita sur granda ekrano. Ni danku la "teknikan skipon", gefiloj de la prezidanto de la LKK, Ange Mateo, kiuj same majstris la viziokonferencon kun la prezidanto de UEA, Duncan Charters. Ĉu invititaj estis lokuloj? Mi ne rimarkis, sed se la publiko ne estis invitita, ni perdis bonan okazon, same kiel por la koncerto de JoMo, kiu ne nur dancigas la homojn sed bele varbas !

Sed kongreso estas ankaŭ okazo pridiskuti la problemojn ligatajn al Esperanto en Francio: instruado, varbado, uzo, trovo de novaj membroj, diskonigo de nia kulturo ktp. Funkciis libroservo, tio donis al mi okazon konatiĝi kun Said, kiu anstataŭas Susanna en la sidejo. Membrokunveno apenaŭ lasis tempon diskuti: veraj diskutoj okazis en laborgrupoj, majstritaj distance de Duncan: "Kiel respondi al kritikoj kontraŭ Esperanto" aŭ dimanĉe, pri UEA kun helpo de Aleks Kadar, ĝia ĝenerala sekretario. La komitatkunsido altigis la jaran kotizon al 59 €. Se kelkaj homoj serioze sekvis la kursojn de Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge, tri kandidatis al la ekzamenoj de FEI, inter ili nia samregionanino Roselyne Favier el Avinjono (junuloj, kiujn mi konvinkis trapasi la ekzamenon, preferis la ludon ekstere). Kaj Marion Quenut prezentis la eŭropan programon Erasmus+. Bela omaĝo al la kanzonoj de Georges Brassens en Esperanto iĝis la prelego far ge-Redoulez, kie miksiĝis la originalo kaj la traduko, kantita de la Kompanoj.

Konklude, tute netipa kongreso: sen kongreslibro, kun dudekminuta malfermo kun prezidanto en mallonga pantalone, sen kostumo, sen kravato, kun amaso da helpantoj por flegi la kongresanojn en bona etoso. Sed, raraĵo, jam estis informilo pri la venontjara kongreso en Liono de la 5-a ĝis la 9-a de majo 2023. Ni atendas vin.



*Provencanoj
en Trélissac.*

Renée Triolle

Dum la komitatkunsidoj de Espéranto-France, en Trélissac, mi anstataŭis Thierry Spanjaard, nian regul-an reprezentanton.

Ĉefaj decidoj rilatas al la kotizo. Kotizo al Espéranto-France ne altiĝis de 10 jaroj dum altiĝis je 10% ĝenerale ĉiuj kostoj. Sekve, post longaj diskutoj estas decidite altigi la kotizon al 59 €. Atentigo estas, ke pro la sidejo, libroservo, akcepto de vizitantoj, do deĵorado de dungito, Said, kiu anstataŭas Susanna-n, taga kosto por unuopa membro estas 70 eŭroj. Do la kotizo ne sufiĉas. Feliĉe venas aliaj enspezoj: donacoj, libroservo, perado de kotizoj. La estraro devas akcenti, ke por impostpagantoj, granda parto de la kotizo estas "repagita" de la ŝtato, do finfine membro pagas nur 20 €!

Alia diskuto rilatis al la "kluba kunsido": propono pri malpli alta kotizo (30 €), se ĉiuj membroj de unu klubo

Thierry Spanjaard

Naturistaj Provencanoj interrenkontis en «La Genèse»

INOE estas la Internacia Naturista Organizo Esperantista.

Kvankam la asocio estas tutmonda kaj havas membrojn en dudek landoj, oni povas konstati, ke preskaŭ triono de la membroj estas francoj kaj pli ol dekono de la tuta membraro loĝas en Provenco kaj ankaŭ membriĝas en Espéranto-Provence. Krome, duono de la estraro de INOE konsistas el Provencanoj. Unu el la kialoj certe estas la klimato: Provenca klimato kaj bela marbordo tute favoras naturistajn spertojn. Krome, mi verŝajne estas alia kialo pro tiu kongruenco inter Esperanto kaj naturismo: mi ofte varbas naturistojn pri Esperanto kaj esperantistojn pri naturismo; kelkfoje, tiu varbado efikas...

ANP (Association Naturiste Phocéenne – Naturista Focea Asocio) kaj la interreta forumo VivreNu (Vivi Nude) kutime organizas grandan renkontiĝon en naturista centro La Genèse, proksime de Barjac, en la departemento Gard, dum la Ĉielira semajnfino.

Kaŭze de la KOVIM-sankrigo, la renkontiĝo okazis nek en 2020 nek en 2021. Pro tio, en 2022 ĉiu estis eĉ pli feliĉa interrenkonti ol kutime!

aliĝas (jam Marseille ekz. faras). Mi argumentis, ke la bremsas estas ĉefe psikologia. Per tiu sistemo, Espéranto-France ricevas malpli da mono sed pli da membroj. La profito estas ambaŭflanka.

En la librostoko, interesa bildstrio estas la traduko de la libro de Lilian Thuram "Ĉiuj superherooj" pri diskriminacio. (*vidu lastpaĝe*) Mi mem donacos al la urba biblioteko en La Ciotat kaj bibliotekoj de mezgradaj lernejoj.

Reelektiĝis la sama estraro, pli malgrandnombra, dum ĉefe mankas kontribuantoj por ĉiuj agadoj (redaktoro de "Le Monde de l'Espéranto", kunordiganto de prelegvojaĝoj, ktp.)

Mankas homoj, kiuj rilatas kun la instruistoj de bazaj lernejoj por prezenti la programon "Akcililo": ni ĉiuj scias, ke Esperanto faciligas la lernadon de fremda lingvo, sed ni devas persone kontakti la homojn kaj poste helpi al instruado. Materialo pretas. Do ek!

INOE profitas de la jam ekzistanta evento por inkluzivi en ĝi sian Esperantan subeventon: ni proponas enkondukon al Esperanto kaj rapidan kurson, por doni al partoprenantoj la bazojn de la internacia lingvo. Dank' al la ĉeesto de Flo, estro de Vinilkosmo kaj INOE-ano, ni ne nur pritraktis la bazojn de la Esperanta kulturo sed ankaŭ povis evidenti al la partoprenantoj la ĉefan rolon luditan de muziko en Esperantujo.



11 homoj partoprenis nian kunvenon, inkluzive de 5 INOE-membroj kaj 6 homoj, kiuj havis la oportunecon malkovri Esperanton kaj ties movadon kaj kulturon. Ni esperas, ke ili daŭrigos sian esploron pri la Internacia Lingvo, baldaŭ lernos Esperanton kaj iĝos INOE-membroj.

Geamikoj ĵus revenis el fora lando... alia ĵus foriris...



Dum sia 2semajna rondveturado de Islando kun Cathy, Jean-François Cousineau havis la oportunon renkontiĝi kun eminenta islanda esperantisto, Jón Elíasson, la 4an de junio en Rejkjaviko.

De dekstre maldekstren:
Alain Rémy kaj lia kuŝbiciklo
+ Christian Castillon, kiu akompanis Alain
dum kelkaj kilometroj ekde la forirpunkto.



Alain Rémy forlasis sian ruldomon por tri monatoj kaj foriris la 21-an de junio.

Jen lia vojplano:

Francujo, Belgujo, Nederlando, Danujo, Svedujo, de-nove Danujo, Germanujo, Aŭstrujo, Slovakujo, Hungarujo, Slovenujo, Italujo... kaj reveno al Francujo ĉirkaŭ la 21-a de septembro.

Entute 7 000 km en tri monatoj.

Saluto al Ukrainio

Renée Triolle

Jen mia propono por saluto al Ukrainio.

Senteme

lam en Kievo, kune manifestacias rusa aktorino, ĉefe konata pro rolo de Komisaró en samnoma filmo, ukrainaj esperantistoj-kantistoj kaj mi.

Por kio? Por defendi straton en Kievo, kiu ligas la havenon kun la supra placo, kie staras la registaraj domoj kaj preĝejo. Flanke de tiu strato staras domoj de artistoj, ateljeroj de pentristoj, domoj-muzeoj de verkistoj (ekz. Bulgakov), ĝi verŝajne estas la plej kultura strato de la urbo, sed ĝi interesas la konstruistojn, kiuj preferas ĉion detruiri...

Nun detruigás pluraj urboj aŭ vilaĝoj pro frenezeco de homoj. Ni esperantistoj estas des pli ŝokitaj, ke ĝenerale ni estas pacamantoj, kiuj konsideras homojn kiel homoj. Pro tio, Zamenhof kreis Esperanton. Ni konas homojn, ĉu rusojn, ĉu ukrainojn, ambaŭ same suferas. Por helpi ilin, ne forgesu la konton "espero" ĉe UEA.

Kaŝita milito daŭras en Donbaso de pluraj jaroj: mia nevo, operkantisto devis en decembro 2018 rapide lerni tutan operon en la ĉeĥa lingvo ĉar la rolonto, juna ukraino, estis mortpafita de snajpero, kiam li vizitis la familion por kristnasko.

En Grezijono, en 2020, Ulrich Brandenburg, eksamba-

sadoro de Germanio en Moskvo, raportis pri la agado de OEKE (Organizaĵo pri Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo - france: OCDE - *Organisation de coopération et de développement économiques*), en kiu li partoprenas por aplikigi la traktaton de Minsko kaj liveri akvon, ankaŭ trinkeblan, al Donbaso. Sed la "agitkomitatoj" ne sukcesis ribeligi la regionon, do venis soldatoj.

Mi konstante pensas pri skribaĵo de Tolstoj en "Rakontoj pri Sebastopolo", dum la t.n Krimea milito (1854-1855), milito por aliro al Mediteraneo, do malfermita maro, eterna sonĝo de Rusio. Kaj la filozofo, antaŭ sango, vunditoj kaj suferantoj, konstatas, ke ĉiuokaze diplomatoj decidas pri la fino de milito, ne la batalantoj. Li do proponas, ke duele batalu reprezentantoj de ambaŭ flankoj dum diskutadas la diplomatoj. Kiam unu mortas, bonvolemlulo anstataŭas lin ktp. Fine de la milito estas manpleno da mortintoj, kaj saviĝis la kampoj, la urboj kaj evidente ankaŭ la homoj. Sed bankrotus la armilfabrikantoj, mi aldonas!

La Seyne estas ĝemeligita kun Berdjansko (sur la Azova maro), Marsejlo kun Odeso kaj supozeble aliaj urboj en nia regiono. Ni povas akcepti homojn kun familio, sendi monon (la prezoj altiĝis en Ukrainio) aŭ rilati kun asocioj, kiuj liveras kuracilojn kaj materialon por vunditoj.

Akirindaj kaj legindaj verkoj

"Ĉiuj superherooj - La pokalo de ĉiuj" Lilian Thuram

Lilian Thuram, futbala ĉampiono de mondopokalo en 1998 kaj de la eŭropa pokalo en 2000, estras fondaĵon kontraŭ rasismo. Kun Jean-Christophe Camus kaj la desegnisto Benjamin Chaud, li verkis bildstrion kontraŭ rasismo.

Michèle Abada-Simon entuziasmiĝis kaj tradukis la 39 paĝojn.

Espéranto-France ĝin eldonis en 2021.

La temo estas daŭre aktuala: rifuĝinta familio disigas la urbeton, kie loĝas niaj superherooj. Dum iuj asertas, ke necesas helpi suferantojn, aliaj timas aŭ kontraŭas. Junaj rifuĝintoj alvenas en lernejo. Futbala matĉo bonvenigas ilin kaj ŝanĝas la vilaĝan etoson.

La milito en Ukrainio aktualigas la problemon de akcepto de eksterlandanoj dum alveno de migrintoj el afrikaj aŭ arabaj landoj daŭre donas argumentojn al ekstredekstruloj.


Donacu al viaj nepoj, najbaroj aŭ lernejoj.

"Ĉiuj superherooj, la pokalo de ĉiuj"

mendbla ĉe la Libro-servo de Espéranto-France, 12 eŭroj .



"L'espéranto, langue dangereuse - Une histoire des persécutions sous Hitler et sous Staline" Ulrich Lins



Le livre est disponible au format papier (475 pages au format A5) et électronique (PDF). Vous pouvez le commander chez votre libraire ou directement sur la boutique de l'Harmattan [en cliquant ici](#).

La langue dangereuse dont il est question dans ce livre, c'est l'espéranto. La langue, qui s'était rapidement diffusée en Europe et dans le monde, a aussi été perçue comme un moyen de communication dangereux par certains pouvoirs politiques. Les persécutions envers certains espérantistes ont commencé dans les années 20 et se sont accentuées jusqu'après la Seconde Guerre mondiale, cependant le mouvement a pu perdurer grâce au courage de certains espérantistes. C'est cette histoire que retrace le livre.

Publié pour la première fois en 1973, en espéranto sous le titre "La danĝera lingvo", ce livre d'Ulrich Lins a connu plusieurs rééditions en espéranto et a été traduit dans une petite dizaine de langues.

La version française qui vient de paraître est la traduction du texte de 2016, qui avait été profondément révisé et enrichi grâce aux sources devenues accessibles après la chute du Mur de Berlin.

Cette traduction est le fruit du travail d'une équipe d'espérantophones qui, pendant deux ans et demi, ont traduit, revu et peaufiné le texte, dans le respect du style de l'auteur. Le texte est complété de nombreuses notes et références.

La traduction française a été coordonnée par Pierre Dieumegard.

infos copiées sur cette page d'Espéranto-France:

<https://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-133-livre-du-mois>

Paĝo de la komencantoj

teksto en facila Esperanto

Petro tre ŝatas¹ la futbalon², sed ne tre ŝatas skribi tekstojn.

Foje en la lernejo, li devis verki pri la temo: "Nia lasta futbalmatĉo³".

Apenaŭ komencis labori la gelernantoj, Petro jam fermis sian kajeron.

La instruistino mire demandis:

- Petro, kial vi ne laboras?

- Mi jam finis, sinjorino.

- Ĉu vere? Nu... montru al mi vian kajeron!

Petro transdonis sian kajeron al la instruistino, kiu povis legi:

"Pluvis kaj la matĉo³ ne okazis."

klarigoj

¹ : Attention de ne pas confondre les verbes **ŝati** et **plaĉi**.

Petro ŝatas la futbalon. / La futbalo plaĉas al Petro.

² : Il est toujours préférable, en espéranto, de choisir des mots pouvant être compris par une majorité de personnes de langues maternelles très différentes.

Ainsi :

football = **piedpilko** (mieux que futbalo)

volley-ball = **retpilko/flugpilko** (mieux que volejbalo)

basket-ball = **korbopilko** (mieux que basketbalo)

handball = **manpilko** (mieux que handbalo)

squash = **kvarmurpilko** (mieux que skvaŝo)

quelques autres sports :

tennis = **teniso**

tennis de table (ping-pong) = **tabloteniso**

rugby = **rugbeo**

³ : Le mot "match" est le plus souvent traduit par "**matĉo**". Il existe aussi le synonyme "**maĉo**", mais ce mot a également un autre sens:

maĉi (mâcher) > **maĉo** (action de mâcher)

Bien sûr, le contexte indique toujours de quel "**maĉo**" il s'agit.



Plurelekta demandaro
laŭ verkoj de Robert Llorens
eldonitaj de *Esperanto-Info*

1 - gramatika

a) Mi restos dudek en Parizo.

1 - tago ; 2 - tagoj ; 3 - tagojn

b) Dum ok tagoj li vojaĝis ŝipo.

1 - por ; 2 - per ; 3 - pri

c) Mi revenos la de oktobro.

1 - dudek ; 2 - dudeka ; 3 - dudekan

2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "akno", "burgono" aŭ "butono" por traduki la francan "bouton"

1 - de vêtement :

2 - botanique :

3 - de peau :

d) elektu "balotilo", "bulteno" aŭ "raporto" por traduki la francan "bulletin"

1 - d'information :

2 - rapport :

3 - de vote :



Superzam'
proponita de
Jean-François Cousineau

1. Kie okazis la 1a Azia Universala Kongreso en 1965?

a- Bangkoko b- Pekino c- Tokio

2. Kiu verkis la romanon "Sur sanga tero" en 1933?

a- Baghy b- Kabe c- Rossetti

3. En kioma jardeko aperis la unuaj muzikdiskoj en Esperanto?

a- 1950-a b- 1960-a c- 1970-a

4. Kiom da gefratoj havis Zamenhof?

a- 4 b- 6 c- neniu

5. Kiu frazo ne taŭgas?

a- Mi iras urbe. b- Mi iras al la urbon.

c- Mi iras en la urbon.

6. Kiu, krom Aŭstralio, estas la plej granda insulo en la mondo?

a- Bafinteritorio b- Groenlando c- Nov-Gvineo

Plurelekta demandaro

1 - gramatika

a: 1 ; b: 2 ; c: 3

2 - vorto-trezora

ĉ1: bukedo ; ĉ2: bosketo ; ĉ3: parfumo

d1: monujo ; d2: borso ; d3: stipendio

Solvoj de la demandoj en EP 128

printempo 2022

Superzam'

1 c > nenie ; 2 c > Baghy

3 a > Auld ; 4 c > Rozalia

5 a > kulpas sia frato

6 a > Germanio (80 M)

**Benzino tro kostas,
veturu per biogaso !**



À noter sur votre agenda

dans notre fédération

1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille

Café linguistique - Brasserie Les Danaïdes
4 square Stalingrad, Marseille 1

dernier mercredi de chaque mois - 17 h - Hyères

Café linguistique - bar de l'hôtel Ibis-Gare
45 rue Edith Cavell (face à la gare)

forums des associations

septembre 10 : La Ciotat (13)

septembre 10 : Le Beausset (83)

septembre 10 : Avignon (84) à confirmer

septembre 10 & 11 : Embrun (05) - Foire bio Génépi

septembre 11 : Marseille (13)

septembre : Fréjus/Saint-Raphaël - infos à venir

septembre - Les Arcs-sur-Argens (83)

pique-nique du club de Fréjus/Saint-Raphaël
infos à venir

novembre 26 & 27 - Le Beausset (83)

stage de fin de semaine - à confirmer
infos dans le n° d'octobre

décembre 17 - Marseille (13)

CIRA - 50 Rue Consolat, 13001 Marseille

Renée Triolle présentera le livre :

"Espéranto - langue dangereuse" (voir en page 6)
et donnera une conférence

+ d'infos dans le n° d'octobre

en France

Baugé (49) - Château de Grésillon

riche programme estival

<http://gresillon.org/?lang=fr>

août 20-27 - Métabief (25)

cours d'espéranto + tourisme

infos : Anne-Marie Ferrier 06 78 45 60 49

en Europe

août 20-27 - Westelbeers

(près d'Eindhoven - Pays-Bas)

78e congrès international de la Jeunesse

<https://ijk2022.tejo.org/>

août 20-27 - Brescia (Italie - Lombardie)

89e congrès italien d'espéranto,

<https://kongreso.esperanto.it/89/>

ailleurs dans le monde

juillet 30 / août 6 - Québec (Canada) - 55e congrès de la Ligue internationale des enseignants d'espéranto (ILEI)

<https://2022.kongreso.org>

août 6-13 - Montréal (Canada)

107ème Congrès universel d'UEA

<https://esperanto2022.ca/fr/accueil>

virtuellement

juillet 29 / août 1 - 95e congrès de l'Association mondiale anationale SAT

<https://satesperanto.org/spip.php?article4987>

Pac-alvoko el Perpignan, por unuopuloj, por la tuta mondo majo 2022

Grupeto da geamikoj, civitanoj, geviroj, kunvenis en Perpignan, sudfrancie, por interŝanĝi pri la temo «milito kaj paco». Venis al ni obseda kaj urĝa demando: «Kion povas fari ni, simplaj kaj negravaj uloj?» Tre rapide ekvenis al ni ideo: diskonigi admonon, esperante ke ĝi estos legita, komprenita, dissendita. Kaj ĉefe ke ĝi estos konsiderita.

Omaĝe al la alvoko de Stokholmo, kiu siatempe kolektis gigantan nombron da subskriboj, tamen sen ebligi ĉesigon de la atomfrenozeco, nia alvoko estas: «Pac-alvoko el Perpignan, por unuopuloj, por la tuta mondo».

Ambicia estas nia celo, modesta nia agmaniero. Ni direktas nin al la tuta mondo, sed ne povas sendi nian alvokon al la tuta homaro. Komence, ĝin ni sendos al kelkaj personoj influaj siaregione, aliloke en Francio aŭ eksterlande.

Ĝin ricevos ankaŭ kelkaj asocioj, kaj ankaŭ «anonimuloj», kiel ni mem estas.



Ni scias, ke la Homaro estas unu kaj nedividebla. Do, gravas ĉiuj: negravuloj kiel gravuloj, silentemuloj kiel oratoroj, maljunuloj kiel junuloj, senmonuloj kiel riĉeguloj. Ĉu sendita al vi aŭ ĉu hazarde ekkonita de vi, ĉi tiu alvoko estas por vi, kaj via konsento ege gravas.

Tio ne estas peticio. Milionoj da subskriboj malsupre de paperfolio: kiucele?

Ĝi estu la voĉo de la senvoĉuloj, de la ok miliardoj da homoj, kiuj nun plenangore loĝas sur malsana planedo. Tial la geamikoj, kiuj lanĉas ĉi tiun admonon, tion faras humile kaj anonime. Kiam vi eklegos ĉi tiun alvokon, kiu ajn vi estas, viavice vi povos ĝin dissendi kaj viviĝi, per iuj ajn rimedoj je via dispono: se konsiencon vi plu havas, kaj pri tio ni certas.

Vi eble estas ŝtatestro. Tiukaze, ni konscias pri la respondecapremego, kiun suferas vi, kompatinda mortanto. Ni kompatas, kaj nia celo, de ni kiuj estas neniu, estas helpi vin plu agi serve al la aliaj.

Tio signifas serve al la ok miliardoj da nunaj homoj, kaj al la venontaj generacioj, se vi ebligas al ili ekekesti. Ni certas, ke tion vi ebligas al ili, ĉar ne eblas alie agi.

Se vi estas unu el la «negravuloj», vi scias same kiel ni, kiom vi estas koncernata: do, kuraĝe agu! Ne timu! Dissendadu ĉi tiun alvokon, kaj travivu ĝin mem viavive. Konigu ĝin, kaj parolu pri ĝi ĉie kaj ĉiukaze. Ni estas kiel gisto en pasto: nepre bezonataj! Milito komenciĝas en ula menso, kaj poste infektas la tutan mondon, kiel viruso. Samas pri Paco!

Pacon ni meritu. Ĝi ne elĉiele venas, envolvita en donacpapero, dum ni, senkonsciaj krimuloj, militas aŭ preparas militon. Pacon ni meritu, provante aŭskulti kaj ankaŭ alparoli respektive aliulon. Ĝin ni meritu evitante trompi aliulon, vole aŭ ne; do atentante pri la alia.

For la imperiismo (speco de ŝtelo) kaj la hegemonio. Evoluo estas nepra kondiĉo por paco: neniu estu flankenlasita, kiu ajn estas la preteksto.

Bonkvalita edukado por ĉiuj, inkluzive la minoritatojn, inkluzive la knabinojn...

Sana ekonomio, kiu prirabas aŭ venenigas nek la homaron nek la naturon. Ekonomio, kiu ne baziĝas sur armila komercado. Ekonomio, kiu malaperigas la ekstreman malriĉecon, la mizeron. Unue la malriĉuloj, unue servitaj!

Ni ĉi tie skribis la plejgravaĵon. Vi kapablos, por vi kaj vialoke, kompletigi la liston de ĉiuj kondiĉoj, por ke regu Paco, por unuopulo ĝis la tuta mondo. Tiel, la homoj kaj popoloj akorde kreos fratecan rondon, kaj la lingva mozaiko proklamos:

Pax, pace, peace, pau, paz, paix, paco, mir, мир, ktp.

Ce texte de Jean-Yves peut être lu ici en français sur le site du 107e Congrès Universel d'espéranto qui aura lieu cet été à Montréal. Il existe aussi, sur le même site, dans sa version en espéranto.

